

# LA ANĜEVA FOLIO

LA FEUILLE ANGEVINE

Visitez  
le Centre Culturel  
Angevin d'Espéranto  
au forum des associations  
Agora

## Kelkaj vortoj

Nia grupo partoprenis la Pacotagon, la 21-an de septembro. Krom la parolado en Esperanto, ni plezure prezentis kelkajn skeĉetojn uzante teatropupetojn. Venonta rendevuo okazos kadre de la Asocia Forumo, je la 9-a kaj 10-a de Novembro. Ni estos feliĉaj renkonti vin tie.

Pierre Jagueneau, Prezidanto

## Quelques mots

Notre groupe était présent à la Journée de la paix, ce 21 septembre et, en plus du discours en espéranto, nous avons eu le plaisir de présenter quelques petits sketches avec des marionnettes. Prochain rendez-vous au Forum des associations, les 9 et 10 novembre. Nous serons heureux de vous y rencontrer.

Pierre Jagueneau, Président

## Paŝtobestoj anstataŭas gazontondmaŝinojn

En pluraj urboj en Eŭropo kaj Usono, oni anstataŭigas gazontondmaŝinojn per bestoj.

La afero nomiĝas eko-paŝtado. Ĝi uzas ŝafojn, kaprojn kaj bovojn por prizorgi herbejojn kaj forigi veprejojn.

En la internacia flughaveno de Ĉikago en Usono, bestoj okupiĝas pri maldensigado de lokoj en kiuj sen prizorgo povus ekesti risiko de fajro aŭ malsekureco.

Cetere, en certaj malfacilealireblaj lokoj tondomaŝinoj ne taŭgas.

Portempaj bariloj malebligas la paŝtantaj bestoj vagu sur la aviadilajn kurejoj.

Similaj klopodoj de ekopaŝtado okazas ĉe la historia kongresa tombejo en Vaŝingtono kaj ĉe konstruaĵoj de la urba registaro en Parizo. Nun la metodo komencas populariĝi ankaŭ en Kanado.

Bovinoj kaj kaproj laboras por helpi bonteni parton de provinca parko en Manitobo.

Tim Fisher, posedanto de aro de ekopaŝtaj ŝafoj en Ontario, rimarkis kreskantan intereson por la fenomeno.

Li asertas ke ŝafojja taŭgas. El naturmedia vidpunkto, ilia uzado plibonigas herbon kaj grundon.

La bestoj povas utili ankaŭ por turismo.

Urbeto en Alberto komencis reklami pri siajn ŝafojn post 21-jara ekopaŝta programo kiam ili konstatis la reagojn de homoj al la ĉarmaj lanaj gazontondistoj.

(franca traduko paĝo 4)

(traduction en franç ais page 4)

Fonto : Radioverda.com



## Agora, la asocia forumo

### Parko de Ekspozicioj en Anĝevo

Organizita ĉiun duan jaron en la anĝeva ĉefurbo, la forumo Agora proponas al Anĝevanoj renkonti asociojn. Efika ilo por la lokaj asocioj, ĝi ebligas al asociaj responsuloj pli bone konigi siajn agadojn.

Tiu 14-a okazaĵo kunigos pli ol 400 anĝevajn asociojn en la Parko de Ekspozicioj de Anĝevo la 9-an kaj 10-an de novembro 2013, kaj proponos multajn demonstraĵojn por faciligi la renkontojn.



### Agora, le Forum des associations à Angers, Parc des expositions

Organisé tous les deux ans par la Ville d'Angers, le forum Agora propose aux Angevins d'aller à la rencontre des associations. Véritable outil promotionnel pour les associations locales, il permet aux responsables associatifs de mieux faire connaître leurs actions au public. Pour sa 14ème édition, il réunira plus de 400 associations angevines au Parc des expositions d'Angers les 9 et 10 novembre 2013 et proposera de multiples animations pour favoriser les rencontres.

# OKAZIS...

## Kongreso de Internacia Fervoja Esperanto-Federacio (IFEFF) kaj Esperanto-France

En Artigues, apud Bordoza, de la 4-a ĝis la 11-a de majo 2013

Partoprenis ĉirkaŭ 150 homoj el 17 landoj

La suno ekbrilis por la grupfoto kiu sekvis la ceremonion de la malfermo. Dum tiu solena kunsido, oni alvokis al la podio tri personojn por aljuĝi al ili diplomon, interalie, al nian anĝevan amikinin, Jeannine Daguin, kiu multe aktivis en la franca fervojista esperanto federacio kaj rolis estiel kasistino en tiu kongreso de Artigues kaj antaŭe por la IFEFF kongreso. Gratulojn !

Dania kongresanino travivis neforgeseblan (kaj raportindan) momenton (fonto : kongres-bulteno n° 3 de Laurent Vignaud kaj André Mirc). Ŝi falis en la ĉefa salono. Ŝi rompita al si la femuroston; oni veturigis ŝin en hospitalon. Marie-Rose kaj Bernard Sarlandie-membroj de la loka asocio "Esperanto-Gironde" kaj ankaŭ kongresanoj ricevis tiun mesaĝon el ilia filino kiu laboras kiel flegistino. "Ĉu vi scias gepaĉjoj ? Mi Esperantumas ĉe la urĝ-akceptejo !" Diversaj agrablaj aktivaĵoj estis proponitaj. La kultura programo estis abunda, bone preparita, interalie :



Palafito en la golfeto de Arkaŝono



La dunon de Pilat supreniras la kongresanoj



Jeannine Daguin prezentas sian diplomon

- **La lirikaĵoj** kantitaj de Morine Stride el ŝia klasika repertuaro.

- **La trupo "La Kompanoj"** (kanta kaj teatra trupo de Esperanto-Gironde) regalis nin per belega spektaklo nomita "La sekreto de la magia trajneto" kiu transportis nin en mirinda vojaĝo. Tiu teatraĵo estis kreita por tiu kongreso kun Marcelo Redulez kiel reĝisoro. Lia bonhumoro kaj ankaŭ de la tuta skipo alportis grandan momenton de gajeco kaj emocio.

- **La koncerto de Kajto**, famkonata grupo, nun duopa (Ankie kaj Nanne).

- **La ĥoruso "Interkant"** prezentis, por la dua fojo kongrese, la plej mondfaman operon "Karmen" far Georges Bizet. Ĝi estis esperantigita. Franjo Levêque, ĥorestrino, instigis la projekton.

Ankaŭ la turisma programo meritis aplaŭdojn. Bordoza ekzemple: Oni diras ke la urbo entenas pli ol 3000 maskojn (ĉizitaj figuroj)

## Congrès de la Fédération internationale des cheminots espérantistes (IFEFF) et d'Espéranto-France

Artigues près de Bordeaux du 4 au 11 mai 2013

Environ 150 participants de 17 pays

Le soleil apparut pour la photo de groupe qui suivit la cérémonie d'ouverture.

Durant cette rencontre solennelle, on appela au podium trois personnes pour leur attribuer un diplôme. Parmi elles, notre amie angevine, Jeannine Daguin, qui collabore grandement au sein de la fédération française des cheminots espérantistes et qui a tenu le rôle de trésorière dans ce congrès d'Artigues et aussi du congrès précédent d'IFEFF. Félicitations !

Inoubliable moment pour une congressiste danoise, et digne d'être rapporté (source : bulletin de congrès n° 3 de Laurent Vignaud et André Mirc) :

Une congressiste danoise est tombée dans le salon principal. Elle s'est rompue le fémur et fut conduite à l'hôpital. Marie-Rose et Bernard Sarlandie, membres de l'association locale "Espéranto-Gironde" et aussi congressistes, reçurent ce message de leur fille qui travaille comme infirmière à l'hôpital où l'on avait transporté la congressiste danoise : "Vous savez quoi, les parents ? Je fais de l'espéranto aux urgences !"

Diverses activités agréables étaient proposées. Le programme culturel était abondant et bien préparé. Entre autres :

- **Les arrangements lyriques** du répertoire classique de la chanteuse Morine Stride.

- **La troupe "La Kompanoj"** (troupe de chant et troupe théâtrale d'Espéranto-Gironde) nous a régales par un beau spectacle nommé "Le secret du petit train magique" qui nous transporta dans

ĉe la muroj de nobeldomoj.

Ankaŭ estis elekteblaj eskapetoj al maro tra pejzaĝoj de pinarbaroj : Arkaŝona golfeto kun la Birda insulo, aŭ la neforgesebla spektaklo de la duno Pilat. Oni supreniras per ĉirkaŭ 150 ŝtupoj kaj el tie malkovriĝas amaso de 60 milionoj da kubmetroj da sablo inter arbaro, maro kaj ĉielo, ktp...

Vere, vere, bona kongreso !

un voyage enchanteur. Cette pièce de théâtre a été créée pour ce congrès avec Marcel Redoulez comme metteur en scène. Sa bonne humeur et aussi celle de toute l'équipe furent un grand moment de joie et d'émotion.

- **Le concert de "Kajto"**, groupe bien connu, chantant maintenant à deux (Ankie et Nanne).

- **Le chœur "Interkant"** présenta, pour sa deuxième fois en congrès, l'opéra le plus fameux au monde, "Carmen" de Georges Bizet. Il a été traduit en espéranto. Franjo Lévêque, chef de chœur, est à l'origine du projet et de l'adaptation.

Le programme touristique a aussi mérité des applaudissements.

Par exemple Bordeaux : on dit que la ville possède plus de 3000 mascarons (figures ciselées) sur les murs des hôtels particuliers.

Il était aussi possible de choisir des escapades à la mer, à travers des paysages de pinèdes : le golfe d'Arcachon et l'île aux oiseaux, ou l'inoubliable spectacle de la dune du Pilat. On y accède par environ 150 marches d'où l'on découvre un amoncellement de 60 millions de m<sup>3</sup> de sable entre forêt, ciel et mer, etc...

Vraiment, vraiment, un bon congrès !

## Paca tago 2013

La C.C.A.E. energie subtenis la projekton 2013 de la kolektivo de Maine-et-Loire por la internacia paca tago, la 21-a de septembro.

Ni kunvenis sur la "Paca placo" de Angers en sunbrila sabato. Krom la legado, esperante, de la oficia mesaĝo por la malfermo de tiu tago (ĝena vero pri la kostoj de ĉiuj militoj). La C.C.A.E. proponis al publiko sian spektaklon de pupoj laŭ la temo elektita de UNESCO : "La pupoj varbiĝas por la paco".

Tri sketĉoj estis skribitaj de grupano kaj prezentitaj de pluraj anĝevaj grupanoj. Temas pri miskompreno pro malsanaj lingvoj kaj solvo per Esperanto.

Post pikniko dum la subiro, poezia koncerto estis proponita de l'asocio 4ACG (eksrekrutoj en Alĝerio kaj liaj amikoj kontraŭ la milito) kaj pli precize de Jacques Lambour kiu prezentis poezian koncerton kaj skribaĵoj pri milito kaj paco (eltiritaj de la poemoj de Gaston Couté). Li estis akompanata de la kompanio "La Petite Fabrique" (La eta fabriko). Jacques, evidente kortuŝata por ĉiam, kiel tiel aliaj soldatoj foririntaj en Alĝerio, atestas. Li atestas pri la stulteco de la

milito, la angoroj dum la bataloj, pri siaj militkompanoj kaj ankaŭ tiuj kiuj li nomas "la alĝeriaj fratoj". Liaj okuloj brilis, estis humidaj. La rigardo de Jacques estis senmova, ofte li mense ŝvebas...ŝvebas; sed tiel bela, de paco plenkplena. !



La reprezentanto de la urbestro alparoladas la publikon



La pupoj engaĝiĝas por la paco

## La Fête de la paix 2013

Le Centre Culturel Angevin d'Espéranto a activement soutenu le projet 2013 du collectif du Maine-et-Loire pour la journée internationale de la paix, le 21 septembre.

Nous étions réunis, place de la Paix en ce samedi particulièrement ensoleillé. Outre la lecture en espéranto du message d'ouverture (message d'une vérité dérangeante sur les coûts de toutes les guerres), le club a proposé au public son spectacle de marionnettes selon le thème retenu par l'UNESCO : "Les marionnettes s'engagent pour la paix".

Trois saynètes ont été écrites par un membre et présentées avec 4 autres membres du groupe d'Angers, sur le thème de l'incompréhension à cause de langues différentes et la solution avec l'espéranto.

Après un agréable pique-nique au soleil couchant, l'association "4ACG" (Anciens Appelés en Algérie et leurs Amis Contre la Guerre), et plus particulièrement Jacques Lambour proposa un concert poétique et des textes inspirés par la guerre et la paix (sur des poèmes de Gaston Couté). Jacques était accompagné par la compagnie musicale "La Petite Fabrique". Jacques, visiblement marqué à tout jamais comme tant d'autres appelés partis en Algérie, témoigna sur "la bête de la guerre", les affres durant les combats, sur ses compagnons de guerre et aussi ceux qu'il appelle "les frères algériens". Ses yeux brillent, sont humides. Le regard est fixe et semble souvent ailleurs...ailleurs; mais tellement beau et rempli de paix !

## Informado pri Esperanto en mezlernejo de Beaupréau

La 30-an de majo, kadre de projekto "internacia semajno", okazis informado pri Esperanto al centoj da lernantoj el kvar klasoj (6ème kaj 5ème) de gimnazio/mezlernejo Charles-de-Foucauld en Beaupréau.

Tion iniciatis Stéphane Lelaure de longa esperantisto kiu tie instruas la anglan. Kun Stéphane, Jeanik kaj Geneviève de la "Centre Culturel Angevin d'Espéranto" estis la intervenantoj kaj Laurent kiu helpis per transporto de la ekspoziciaj paneloj. La

lernantoj montris sin vere interesataj kaj reagemaj.



La internacian lingvon al la lernantoj prezentis Janik kaj Stefan

## Information sur l'espéranto au collège de Beaupréau

Le 30 mai 2013, à l'initiative de Stéphane Lelaure, professeur d'anglais au collège Charles-de-Foucauld de Beaupréau, a eu lieu une information sur l'espéranto dans le cadre du projet "semaine internationale" auprès d'une centaine d'élèves de 4 classes de 6ème et 5ème. Stéphane est aussi espérantophone de longue date. Avec lui, Jeanik et Geneviève du Centre Culturel Angevin d'Espéranto sont intervenus avec l'aide de Laurent (transport des panneaux) pour présenter la langue internationale aux élèves qui se sont montrés très intéressés et réactifs.

# OKAZOS.....

## Kalendaroj 2014

Kun mallonga prezentado de la lingvo kaj kelkaj ekzemploj de frazoj, la eta Eo-kalendaro estas bona varbilo. Ni povas mas-disdoni ĝin en mezlernejoj, liceoj, universitatoj, foiroj, bazaroj... Homoj ofte petas kromajn informojn; tial la kalendaro estas privilegia ilo por unua kontakto !



## Calendriers 2014

Avec une rapide présentation sur la langue et quelques exemples de phrases, le petit calendrier « espéranto » est un support idéal pour une distribution en masse dans les lycées ou universités, les foires et marchés... Les personnes demandent souvent plus d'informations, ce qui en fait un outil privilégié pour un premier contact !

En 2015, notenda evento sur via agendo :  
 la UEA-kongreso en Francio !



## Maison Culturelle de l'Espéranto Château de Grésillon

### Jarfina FESTego kun novjara Silvestra FESTeno

Alveno ekde sabato, la 28a de decembro 2013, posttagmeze  
 Foriro ĝis ĵaŭdo, 2a de januaro 2014, posttagmeze

Prezoj por la tuta restado : 200 - 400 €

Reduktita ĉioinkluziva prezo valida ĝis la 2a de decembro 2013  
 Silvestra (Novjara) festeno (inkl. vinoj) kaj masko-balo (sen tranokto) : 40 €

Alia periodo : laŭ la tarifoj + festena suplemento 25 €

### Fête de fin d'année avec Réveillon de la St-Sylvestre "Grési-veillon"

Arrivée à partir du samedi 28 décembre 2013 après-midi  
 Départ jeudi 2 janvier 2014 après-midi

Prix séjour entier : 200 - 400 €

Prix réduit du forfait tout inclus valable jusqu'au 2 décembre 2013

Réveillon de la St. Sylvestre (vins inclus)  
 et bal costumé (sans nuitée) : 40 €

Autre période : selon les tarifs  
 + supplément réveillon 25 €



Toutes les informations : [www.gresillon.org/findannee](http://www.gresillon.org/findannee)

Inscriptions : [www.gresillon.org/inscriptionj](http://www.gresillon.org/inscriptionj)

(sekvo de la paĝo 1)

## Des animaux en pâture remplacent les tondeuses à gazon

Dans plusieurs villes d'Europe on remplace les tondeuses à gazon par des animaux.

Le procédé se nomme éco-pâturage. Il utilise des moutons, des chèvres et des vaches pour entretenir les herbages et supprimer les mauvaises herbes.

Les animaux de l'aéroport international de Chicago aux Etats-Unis s'occupe de dédensification

d'endroits sans entretien où pourrait naître un risque de feu ou d'insécurité.

Du reste, dans certains endroits accidentés les tondeuses mécaniques ne conviennent pas.

Des barrières provisoires empêchent que les animaux en pâture divaguent sur les pistes d'aviation.

Des expériences similaires en éco-pâturage sont poursuivies au cimetière historique du congrès à Washington et aux constructions de la direction urbaine de Paris. Maintenant la méthode commence à se populariser aussi au Canada.

Des vaches et des chèvres travaillent pour aider à la maintenance d'un parc provincial dans le

Manitoba.

Tim Fisher, propriétaire d'un troupeau de moutons en éco-pâturage en Ontario, a noté un intérêt grandissant pour ce phénomène.

Il dit que les moutons conviennent bien. Du point de vue environnemental, leur utilisation est bénéfique pour l'herbe et le sol.

Les animaux peuvent aussi être utiles pour le tourisme.

Une petite ville dans l'Alberta a commencé à promouvoir ses moutons suite à un programme d'éco-pâturage de 21 ans après qu'elle eut constaté les réactions des visiteurs devant les charmants et laineux tondeurs de gazon.



## Aĉetebraj !

Nia libroservo ĵus akiris 2 Esperanto-libretojn :

### "Paul Éluàrd - Poemaro"

Ĉirkaŭ 30 poemoj en Esperanton tradukitaj de Christian Rivière. Prezo : 5 €

### "Vortfarado kaj Radikfarado"

Eseo de Christian Rivière pri la vortoj en Esperanto. Prezo : 4 €

## A vendre !

Notre service de librairie vient d'acquérir 2 petits ouvrages en espéranto :

### "Paul Éluàrd - Poemaro"

Une trentaine de poèmes traduits en espéranto par Christian Rivière. Prix : 5 €

### "Vortfarado kaj Radikfarado"

Essai de Christian Rivière sur la formation des mots en espéranto. Prix : 4 €



# La mano

Polekso al vojaĝo ekiras  
 Montrofigro stacidomon montras  
 Mezfigro forta la valizon portas  
 Por ringfigro mantelo sufiĉas  
 La fingreto postkuras la tuton  
 kvazaŭ hundideto.

J.Y.S

## Ni ludis

N° 16	1	KLEPTOMANI	A	KATAKLISMO
	2	KLIPEROJ	B	ERIO - PER
	3	TEZEO - VIVO	C	EKZEMPOJ
	4	AREN - MOD	Ĉ	PLENO - ORLO
	5	KIMONO - AM	D	TIO - NOKTOJ
	6	LOP - ORK - IN	E	OP - MORSI
	7	LOKSIO	F	MEVO - KIS
	8	SPORTISTIN	G	ARIDA - OTIM
	9	MEJLO - ILI	Ĝ	NOV - MI - ILI
	10	OR - OJDEMIO	H	IJOB - NENIO

## Ni ludas

### Horizontale :

- 1) Frukto simila al mandarino.
- 2) Cervoskarabo (sf) – Ĉevalfelo blanka kaj ruĝa (sf).
- 3) Konkluda parto de verko – Sidi sen i !
- 4) Ortodoksa pastro – Malokupi lokon (sf).
- 5) Suda fino de Eŭropo.
- 6) Konjunkcio – Rezulto de adicio (sf) – Egipta dio de Suno (sf).
- 7) Transformi metalon en ercon.
- 8) Reĝseĝo (sf).
- 9) Komunikdrato inter cerbo kaj organo (sf) – Li ludas rolon en teatraĵo (sf).
- 10) Martelo aŭ segilo (sf) – Nedifinita pronomo – La lasta peco de la puzzle de nia vivo ! (sf).

### Vertikale :

- A) Ŝtelademo pro mensa malsano (sf).
- B) Sovaĝa rabobesto – 536,33 metroj ĉinie (sf) – Ekstere.
- C) Provizi iun aŭ ion per ĉio necesa por la difinita funkcio – Notario sen vokaloj !
- Ĉ) Ne fari tion, kio estas ordonita.
- D) Japana monunuo – Monunuo de Eŭropa Unio.
- E) Rilata al eŭropa lando.
- F) Ekvidi serĉaĵon – Mallonga kilometro.
- G) Morfemo – Tenso esprimanta okazintan fakton en pasinteco.
- Ĝ) Eligi el si idon (sf) – Plej forta (sf) – Flava metalo (sf).
- H) Prilabori ion, por ke ĝi donu regulajn sulkojn (sf) – Bori (inv).

N° 17 (sf) : sen finaĵo (inv) : inverse Ŭ = U

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G	Ĝ	H
1										
2										
3										
4										
5										
6										
7										
8										
9										
10										

# Kalendaro

## Selektitaj renkontoj / staĝoj / kongresoj

### 8-10 novembro

4-a BIERo, Brila Internacia Esperanto-Renkontiĝo en Píbram, **Ĉeĥio**. Atendas vin: renkontiĝo kun amikoj, trarigardo de la urbo Píbram, ekskurso al bierfabriko en Březnice, gustumado de biero, vizito al mineja skanzeno, testo, ludoj, konkursoj, bunta kutima komuna matenmanĝegado, ktp. Aliĝoj ĉe: [pismis@volny.cz](mailto:pismis@volny.cz)

### 8 - 11 novembro

Glivicea rendevuo GRUPE 17 - en Gliwice, **Pollando**. Inf.: Pola Esperanto-Asocio - Filio en Gliwice, [staman@ka.onet.pl](mailto:staman@ka.onet.pl)

### 16 - 17 novembro

25-a Eŭropa-Rendevuo - en Stella-Plage, **Francio**. La plej grava internacia semajnfino en Francio, norde de Parizo. Bunta programo: 3 diversnivela lingvokursoj, staĝo por korusaj kantistoj, koncerto de Gijom Armid, ekspozicio de artaĵoj, impona libroservo, meso en Esperanto. Inf.: Arlette Plutniak, 2bis, rue Ste Marguerite apt 23 Residence les Archers, FR-62000 Arras, Francio. Rete: [aplutniak@esperanto-nord.org](mailto:aplutniak@esperanto-nord.org)

### 13 - 15 decembro

61-a Studsesio - en Herzberg am Harz, **Germanio**. Klerigado, studmodulo: literaturo, movadhistorio, ktp. Tradicia Zamenhof-festo kun vespera kulturprogramo. Inf.: Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz - La Esperanto-urbo, Germanio. Tel.: +49(0)5521-5983, rete: [esperanto-zentrum@web.de](mailto:esperanto-zentrum@web.de)

### 14 - 15 decembro

14-aj Bjalistokaj Zamenhoftagoj - en Bjalistoko, **Pollando**. Prelegoj, kulturaj prezentoj, ekskurso tra la regiono, pikniko. Inf.: Bjalistoka Esperanto-Societo, PL-15-282 Bialystok, str. Piekna 3, Pollando. Rete: [esperanto.bialystok@interia.pl](mailto:esperanto.bialystok@interia.pl)

### 27 decembro - 3 januaro

30-a IF - Internacia Festivalo - jubilea kaj adiaŭa - en bavara urbeto Nördlingen, **Germanio**. Komforta kaj moderna domo, proksima al la urbocentro kaj situanta ĉe mezepoka urba muro. Kadra temo: Retrospektive. Tuttaga ekskurso al Rothenburg ob der Tauber, prototipo de germana mezepokeca urbo. Inf.: Hans-Dieter Platz (HDP), Postfach 1148, DE-34303 Niedenstein, Germanio. Tel. +49-5624-8007, portebla +49-171-4964558, Reto: [HDP@internacia-festivalo.de](mailto:HDP@internacia-festivalo.de)

### 27 decembro - 3 januaro

12-a NR - Novjara Renkontiĝo - en Saarbrücken, **Germanio**, apud la germana-franca landlimo. Kutime ĉ. 150-200 gastoj - inter ili sesdeko da infanoj kaj junuloj. Apartaj programoj por junuloj sub la nomo "Novjara Internacia Semajno" (NIS). Konversacia rondo kaj kursoj por komencantoj kaj progresantoj. Inf.: EsperantoLand, Lu Wunsch-Rolshoven, Wiclfestrasse 9, DE-10551 Berlin, Germanio, rete:

[lu.esperantoland@gmx.de](mailto:lu.esperantoland@gmx.de)

### 28 decembro - 2 januaro

SANO-4 - alternativa jarŝanĝa seminario en Herzberg am Harz, **Germanio**. Sano - alternativo - Novjaro. Inf.: Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz - La Esperanto-urbo, Germanio. Tel.: +49(0)5521-5983, rete: [esperanto-zentrum@web.de](mailto:esperanto-zentrum@web.de)

### 28 decembro - 4 januaro

5-a Afrika Kongreso - en Kotonuo, **Benino**. Kongreso kun ampleksa programo, por kunigi esperantistojn el la tuta Afriko por ke ili amuziĝu, laboru kaj interkompreniĝu uzante Esperanton. Inf.: Afrika Komisiono de UEA, Adjé Adjévi, BP. 416 Lokossa-Mono, Benin. Telefono: +228 90257549. Reto: [ake-2013@yahoo.com](mailto:ake-2013@yahoo.com)

### 17 - 20 januaro

9-a Internacia Esperanto-Renkontiĝo de Meditado en Iksan, **Koreio**. Esperantista Asocio de Uonbulismo okazigos renkontiĝon, en kiu oni povas praktiki meditado, kaj sperti korean kulturon. Inf.: Esperantista Asocio de Uonbulismo, Koreio. Rete: [esperanto@saluton.net](mailto:esperanto@saluton.net)

### 24 - 26 januaro

1-a Internacia Esperanto-Kongreso en Granada, **Nikaragvo**. Temo: pli bona mondo eblas. Unuafoje okazos internacia renkontiĝo en tiu alloga lando de Centra Ameriko. Inf.: Esperanto Nicaragua, rete: [kongreso2014@esperanto-nicaragua.org](mailto:kongreso2014@esperanto-nicaragua.org)

### 25 februaro - 1 marto

2-a Sud-Azia Seinario, SAS-02 - en Lahore, **Pakistano**. Inf.: Pakistana E-Asocio, rete: [pakesa@yahoo.com](mailto:pakesa@yahoo.com), aŭ Adeel Butt, retadreso: [adeelbutt@asia.com](mailto:adeelbutt@asia.com), poŝtelefono: +92 313 5363211

### 6 - 17 marto

Speciala ekskurso 2014 - en Katmandu, **Nepalo**. Ekskurso por ĉiuj aĝgrupoj. Subtenita de Nepala Registara Turisma Komisiono. La ĉefa celo estas propagandi Esperanton. Inf.: Nepala Esperanto-Asocio (aliĝinta al UEA), G. P. O Box 10518, Kathmandu, Nepal. Rete [nespa.1990@gmail.com](mailto:nespa.1990@gmail.com)

### 8 - 9 marto

Vintraĵ Tagoj - en Turku, **Finnlando**. Aktulaj aferoj en formo de publika prelego, diskutoj, turismaj programoj, jarkunveno de EAF. Inf.: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Rete: [eaf@esperanto.fi](mailto:eaf@esperanto.fi)

### 8 - 15 marto

Mediterranea Esperanto-Semajno, MES-2014 - en restadejo Val d'Esquiere - Les Issambres ĉe la Lazura Marbordo, **Francio**. Ĉu vi ankoraŭ frostas en via regiono? Tuj venu al la Mediteranea Maro, kie floras mimosoj kaj migdalarboj! Vin atendas amika familia etoso, bona ripozo kaj lazura maro... Informoj kaj aliĝoj: Monique Prezioso, 92 allée des Harkis,

FR 83700 Saint-Raphaël, Francio, rete: [prezmoni@hotmail.com](mailto:prezmoni@hotmail.com), tel. 0033 (0)4 94 83 06 88 - aŭ Christine Graissaguel, [kris\\_grai@hotmail.fr](mailto:kris_grai@hotmail.fr)

### 5 - 10 aprilo

7-a Mezorianta Esperanto-Kunveno - en Tbilisi, **Kartvelio**. Belega lando... bonega etoso... Renkontiĝo de esperantistoj el mezorientaj landoj kun prelegoj, ekskursoj, artaj aranĝoj. Homoj povas veni antaŭ aŭ post la kunveno kaj ili povas pasigi tempon en Kartvelio (ni gvidos ilin tra Kartvelio laŭeble...). Konkurso pri la libro: "Kavaliro en la tigr felo". Informoj ĉe Renato Corsetti, rete: [mezorianta.kunveno@esperanto.org](mailto:mezorianta.kunveno@esperanto.org)



## Cours d'espéranto à Angers

Les cours d'espéranto pour débutants et les cours de conversation ont repris début octobre. N'hésitez pas à y participer pour apprendre ou progresser dans une ambiance détendue et amicale.

Lieu : Salle du Petit-Mathurin, avenue Jean XXIII, La Roseraie, Angers.  
 Débutants : mercredis de 18h30 à 20h.  
 Conversation : vendredis de 18h à 19h30.

**Renseignements : 02 41 73 17 97**

La Esperanto-kursoj por komencantoj kaj "konversacio" re-ekis komence de oktobro. Ne hezitu partopreni ilin por lerni kaj progresi en malstreĉa kaj amika etoso.

Loko : Salle du Petit-Mathurin, avenue Jean XXIII, La Roseraie, Angers.  
 Komencantoj : merkredo de 18h30 ĝis 20h.  
 Konversacio : vendredo de 18h ĝis 19h30.

**Informo : 02 41 73 17 97**



## Nous contacter

### Centre Culturel Angevin d'Espéranto

41 rue Pierre Melgrani 49000 Angers  
 Tél. 02 41 73 17 97 - Courriel : [info@esperanto-angers.fr](mailto:info@esperanto-angers.fr)

## Vous informer

### www.esperanto-angers

[www.esperanto-france.org](http://www.esperanto-france.org), [www.esperanto-jeunes.org](http://www.esperanto-jeunes.org)  
[www.uea.org](http://www.uea.org), [www.esperanto.net](http://www.esperanto.net)